

---

## 戒名（法名、法号）の意味

### *Signifo de budhana nomo*

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

---

次のような文章に出会って驚いたことがあります。

「戒名は幽界で使う名前である。現界の名前は通用しないので、現界での執着を取るためにも、現界の名前と違う名前をつけなければならない。」

またある高名な僧侶が次のようなことを言っています。

「法名とか戒名というのは、死んでから地獄行き・極楽行きの判定を下す裁判をする時、俗名のままだと悪い過去がすぐばれてしまうから名前を変える。閻魔さんも馬鹿ですから、名前で誤魔化されてしまうんです。だから法名とか戒名って、大抵偉そうな名前でしょ。悪いことを散々した人ほど偉そうな名前が必要で、そのため金がかかるんです。だから私も親父も法名はつけていません。」

上に見られるような「戒名とは死後の世界へのパスポートである」というような理解は世間では普通なのかも知れません。その一方で、戒名など必要ない、という考えの人もあります。

戒名の由来は、出家して仏弟子となった者に与えられる名前のことです。日本以外の仏教国では、在家信者が戒名をもつことは一般的ではないようです。それゆえ、戒名がどうしても必要である、とまではいえないでしょう。俗名のまま葬儀を執行しても差し支えはあ

Iam mi legis ĉi-suban frazon, kiu surprizis min: "Budhana nomo estas la nomo uzata en la postmorta mondo. La nomo en tiu ĉi mondo ne validas tie; oni devas havi alian nomon ol la nunan por forigi alligitecon al tiu ĉi mondo."

Iu fame konata bonzo diras ĉi tiel: "Kial oni havas budhanan nomon? En la kortumo juĝanta nin, ĉu inda al infero aŭ al paradizo, la nomo en tiu ĉi mondo ne taŭgas, ĉar per ĝi la juĝisto Jama facile ekscias nian malbonan pasintecon. Jama estas malsaĝa, do estas trompita de nomŝanĝo. Sciu, ke budhana nomo ofte estas impona. Ju pli multajn malbonaĵojn li faris, des pli imponan nomon li bezonas; por tio li pagas multe da mono. Tial nek mi nek mia patro ne havas budhanan nomon."

Kiel vi vidas ĉi-supre, verŝajne estas ordinara kompreno, ke budhana nomo estas la pasporto al la postmorta mondo. Dume kelkaj opinias, ke budhana nomo tute ne necesas.

Budhana nomo devenis de la nomo, kiu estas donita al budha disĉiplo foriginta sian hejmon. En la aliaj budhismaj landoj krom Japanio laikaj kredantoj malofte havas budhanan nomon. Tial budhana nomo ne nepre necesas. Funebra ceremonio kun sekulara nomo estas

りません。戒名は成仏のための必要条件ではありません。

しかしながら、戒名をもつことは、仏弟子としての名のり、仏教徒としての自覚の証という意味があると思います。キリスト教では洗礼名（クリスチャン・ネーム）というのがありますが、それと同じような意味を戒名はもっている、と考えればいいでしょう。

人はみな、生まれた時に親から名前をつけてもらい、一人の人間としての歩みをはじめます。同じように、戒名を授かることは、俗世間の中で生きるだけでなく俗世間をこえて生きる仏教徒としての歩みの出発点であります。ただしこれはあくまでも、そのような自覚を促す意味であって、戒名をもたなければ仏教徒とはいえない、とまではいえないでしょう。

ですから、「死んだら戒名をつけてもらう」というのは、実はあまり意味がないことになります。戒名を授かるのであれば、生前に授かるべきです。また、戒名は長いほどよい、というのもばかげたはなしです。厳密には戒名は二文字が原則であり、院号や道号や位号が付属するので長くなるのです。院号とは、生前に一寺を建立するほどに財政的援助をした人に与えられる名前を意味しますので、院号を頼めば高額の名料になることは覚悟しなければなりません。見栄をはる必要はありません、二文字の戒名で十分です。

なお、真宗では法名、日蓮宗では法号といいますが、その持つ本質的な意味は戒名と同じです。

senproblema. Budhana nomo ne estas necesa kondiĉo por enbodiigo.

Sed budhana nomo havas gravan signifon: sindeklaro kiel budhan disĉiplon aŭ atesto de memkonscio kiel budhano. Budhana nomo havas preskaŭ saman signifon kiel kristana nomo aŭ baptnomo en kristanismo.

Al ĉiu homo donas nomon liaj gepatroj, kiam li naskiĝas; ekde tiam li komencas paŝon kiel homo. Tiel same, ekposedi budhanan nomon estas la startpunkto por budhano, kiu vivas ne nur en la sekulara mondo sed super la sekulara mondo. Tio ĉi tamen nur signifas, ke budhana nomo akcelas memkonscion de budhano, sed ne ke tiu, kiu ne havas budhanan nomon, ne estas budhano.

Tial havi budhanan nomon post morto estas iom sensenca. Se vi volas havi budhanan nomon, petu ĝin antaŭ via morto. Cetere ankaŭ sensenca estas la publika opinio, ke ju pli longa estas budhana nomo, des pli bone. Principe budhana nomo konsistas el du literoj; se oni aldonas honoran titolon, bodian titolon aŭ rangon titolon, la tuta nomo longiĝas. Honora titolo estas donata al tiu, kiu kontribuis finance tiom, kiom sufiĉas por konstrui templon. Do petante honoran titolon, oni devas sin pretigi al multege da mono. Sed ne necesas parado per longa nomo. Dulitera nomo sufiĉas.

Aldone, por esprimi "budhanan nomon" troviĝas diversaj dirmanieroj laŭ skoloj; sed ili ĉiuj esence havas la saman signifon.